



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Kaktoj – pikantaj beluloj

Prelegos: Oldřich Arnošt Fischer

Familio kaktacoj (*Cactaceae*) enhavas pli ol du miloj da kaktaj specioj. Origine ili troviĝis nur en Ameriko de 56° de norda latitudo ĝis 52° de suda latitudo (de Kanado ĝis Patagonio). Danke al gluemaj semoj birdoj disvastigis kaktan el la genro *Rhipsalis* en Afrikon kaj Azion. Homoj plantas kelkajn kaktajn speciojn en Eŭropo, Afriko (en ĉirkaŭaĵo de Mediteraneo) kaj Aŭstralio. La kaktoj apartenas al sukulentoj, tio signifas, ke ili bonege adaptiĝis al manko de akvo. Ili havas signifon kiel fontoj de nutraĵo de bestoj kaj homoj, fuelo, plibonigas grundon kaj kreas rifuĝejojn al birdoj kaj bestoj. Efikaj substancoj de kaktoj ĝis nun ne estis ĝisfunde ekzamenitaj. Ĉiuj membroj de la familio *Cactaceae* estas protektataj de leĝoj, sed iliaj naturaj trovlokoj estas endanĝeritaj de forhakado de arbaroj kaj senskrupula ekspluatado de krudaj materialoj. Beleco de florantaj kaktoj alogas vastan publikon. En Ĉeĥa Respubliko funkcias kluboj de kaktistoj kun centjaraj tradicioj.

Ĉeesta programo, ĝi estas registrita.

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 8-an de novembro 2023 je la 18-a h. (La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

Kie: Občanský klub, [Hybešova 65a](#), Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la [mapon](#). La plej proksima tramhaltejo estas Václavská (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)



Ni rekomendas

- La 23an — 26an de novembro, **La 4-a Virtuala kongreso de Esperanto**, rete
- La 3an — 10 de aŭgusto 2024 **Universala kongreso**, Aruŝa, Tanzanio. La plej favora prezo nur ĝis la jarfino.



Cetera programo en novembro

La 15-an **Aruŝa 2024** – John Magessa, rete per Zoom, komuna renkotiĝo kun klubo Glivice

La 22-an **Esperanto Simpozio en Gherla (Rumanio)** – Oldřich Arnošt Fischer, Klubejo Hybešova

La 29-an **Venediko** – Michał Ryszard Balicki, rete per Skajpo

Programo en decembro

La 6-an *Ankoraŭ ne agordita*, Klubejo Hybešova

La 13-an *Ankoraŭ ne agordita*, rete per Zoom, komuna renkotiĝo kun klubo Glivice

La 20-an **Antaŭkristnaska renkontiĝo**, Klubejo Hybešova



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobno.cz/index.php/eo/aprogramo>),

- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brna)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/@esperantobrna) (<https://www.youtube.com/@esperantobrna>).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrna.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra turo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)